



Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Jarraporto de ILEI por 1950-1951 - Komentario

La Ligo estis fondita en Britio en julio 1949 kadre de la UK en Bournemouth. La nuna raporto atingis nin el Finnlando. La subskriboj estas de la fonda prezidanto, s-ino Violet C. Nixon, kaj la sekretario/kasisto s-ro Einar Dahl el Svedio. La raporto ŝajnas esti iel multobligita, sur ambaŭ flankoj de malnova paperformato. Krajonaj aldonaĵoj aperas, neklare ĉu faritaj de la verkintoj, ĉu poste, ekzemple en Finnlando.

Kion ni ekscias el ĉi tiu raporto, kiun ni ne sciis antaŭe?

- 1) Ni scias la kvin fondo-sekciojn de la Ligo: Britio, Germanio, Francio, Nederlando kaj Svedio. Ni scias plie iliajn nacilingvaj nomojn.
- 2) La estraro en 1950 (supozeble la fonda estraro) konsistis el po unu persono el tiuj kvin landoj.
- 3) Finnlando estis forte enplektita en la laboroj dekomence, kun statuso pli forta ol tiuj de la aliaj landoj (Finnlando havis komitatanojn, la aliaj reprezentantojn).
- 4) ILEI eĉ tiam havis kontaktojn en 18 landoj tra ĉiuj kontinentoj, kun laŭdinda kvanto da instruado: 120 instruistoj gvidis kursojn por pli ol 5 mil lernantoj.
- 5) La fonda organo de la ligo estis LA JUNA VIVO, redaktata en Nederlando, esploro vidigas titolpaĝon en Ipernity - kun subtitolo 'Organo por la Junularo, Instruistoj kaj Amikoj de la Junularo.' Tio atestas al proksima kunlaboro tiam inter la naskiĝantaj TJO (poste TEJO) kaj ILEI. LJV estis antaŭulo de la nuna revuo de TEJO *Kontakto*.
- 6) ILEI jam komence estis kunlaboranta faka asocio de UEA (en 1990 ĝi fariĝis aliĝinta faka asocio).
- 7) La fonda nomo de la Ligo uzis la vorton 'Esperantistaj' – emfazante ke ĝi akceptas instruistojn de ajnaj fakoj. En postaj statutoj foje aperis 'Esperanto-Instruistoj' – esplora ĉu rezulte de decidoj aŭ nur redaktaj misoj.
- 7) La resuma statistiko pri instruado (plus raportoj el unuopaj landoj) montras intensecon pri kio ni nuntempe ĝojus.
- 8) ILEI tuj je la fondo akceptis la taskon statistiki la staton de instruado tra la mondo (tiutempe temis preskaŭ ĉiam pri lerneja instruado).
- 9) La membronombro en la establitaĵoj estis maksselfaliga – se nur tio persistus hodiaŭ! Kelklunde la membraro fontis rekte el tiu de la Landa Asocio, kio raras nuntempe. STEB en Britio raportis 218 membrojn, estis 70 en Nederlando kaj 250 en Svedio.

La verko havas fortan idealisman tonon, kaj spegulas bone sian epokon.

Komentoj kaj rapida analizo, SMG 7an de januaro, 2013.

Ni provas akiri foton de Violet C. Nixon. Laŭ anglaj cenzo-datums, tre eble ŝi naskiĝis en Chester en ĉ. 1894, se vera, ŝi estis 54-jara kiam ŝi fariĝis prezidanto. La jaro de forpaso estas nekonata, nek ĝis kiam ŝi restis prezidanto, aŭ tenis aliajn oficojn (el leteroj en 1956-57 – vidu sub 1956) ŝi rolas kiel sekretario, kasisto kaj enlanda redaktoro). Aperis poŝ-vortaro angla-Esperanta en la sesdekaj

jaroj, konvena por lernantoj; en Nov-Zelando ni nomis ĝin ‘the Nixon dictionary’. Ĝi ne aperas en la katalogo de UEA. Scivolinda ĉu Violet aŭ iu parenco estis la aŭtoro.

Sur la lasta dorsflanko estas skribita 866, tre eble registra numero en iu arĥivo (eble en Finnlando).

Mi dankegas al Sylvia Hamalainen kaj la finna sekcio, kiu sendis ĉi tiujn trezorojn. Ŝi konfirmis, ke ĉi tiuj dokumentoj povas esti publikigitaj.

Leteroj de Violet C. Nixon

Resumo de leteroj inter f-ino Nixon kaj la finna sekcio. La leteroj de f-ino Nixon estas ĉiuj dupaĝaj kaj duflankaj. Ĉiu ŝajnas originala tajpaĵo, krom numero 2, kiu ŝajnas esti karbonpapera kopio:

1) 1965, septembro.

Al s-ro Herman Noponen, nova prezidanto de la Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj (ELFI).

2) 1957, januaro

Al la sekcio, kun raporto pri la brita sekcio kaj starigo de principaj demandoj.

3) 1957, aŭgusto

Al s-ro Noponen en Tampere. Provo aligi la finnan sekcion al ILEI.

4) 1957, novembro

Letero de s-ro Noponen al f-ino Nixon, en Brimingham.

5) 1957, novembro

Al: s-ro Noponen. Teknikaj klarigoj kiel rilatu la finna sekcio kun ILEI. Ŝajne respondo al la supra letero.

Notoj pri 1)

La lasta listo de instruado en Finnlando atingis f-inon Nixon en 1953. Ĝi aludas al projekto ‘Infanoj de la Mondo’ pri kiu indas ekscii pli; japanoj partoprenis. En 1950 la organo de ILEI (skribita tiam I.L.E.I.) estis ‘La Juna Vivo’. Tio ŝajne ne plu restis la organo, f-ino Nixon skribis, ke la organo estas ‘Instruista Letero’ eldonita el Svedio. Ni ekscias, ke la brita sekcio havis tiam revuon kiu aperis trifoje jare, kaj f-ino Nixon redaktis ĝin. Floris jam tiam ‘Grajnoj en Vento.’ Ekzistis Lerneja Koresponda Centro, supozeble en Britio, sub prizorgo de ‘fraŭlino Tegg’, malklaras ĉu tio estis brita aŭ internacia centro.

Notoj pri 2)

Ĉe la leterkapo staras ‘Centra Oficejo’. Klare temis pri la loĝejo de f-ino Nixon. Ĝi resumas la staton de la brita sekcio (191 membroj kompare kun 250 en 1950). La teksto aludas al ‘Esperanto Vocabulary’ nove eldonita de STEB, kiu povas esti la poŝvortaro, kiun ni uzis en Nov-Zelandaj lernejoj en la sesdekaj jaroj. La rilatoj inter STEB kaj BEA (la nuna EAB) estis tiam bonaj. Ni ekscias, ke ILEI planis komitatkunsidon kaj/aŭ publikan kunsidon en la Universala Kongreso en Marseille. Rimarkinde, ĉi tiu letero finiĝas per funkcia linio ‘Sekretariino de I.L.E.I.’ Malklare ĉu ŝi estis tiam la sola sekretario, kiam (aŭ se) ŝi elektiĝis, kaj ĉu aŭ kiam ŝi demisiis el la prezidanteco. Ŝiaj aliaj leteroj ne indikas funkcion leterfine.

Notoj pri 3)

La enhavo sugestas, ke la finna sekcio dum jaro ne korespondis kun ILEI. Ni scias, ke Komitatkunsido efektive okazis en Marseille, kun unu finna partopreninto. Tie oni altigis la kotizon, konfirmis, ke ‘Instruista Letero’ restas la organo kaj enkondukis la eblon por individuaj membroj, alirebla per abono al la organo.

Notoj pri 4)

Ĉi tio ŝajnas respondo al la antaŭa letero. Ĝi konfirmas deziron je plia aliĝinteco, atestas, ke eĉ tiam ofic-transdonado estis problema, kaj petis pliajn praktikajn informojn.

Notoj pri 5)

Denove letero de la 'Centra Oficejo de ILEI'. Ĝi havas krajonajn kromnotojn – finnaj tradukoj de ŝlosilaj vortoj. Ni ekscias, ke STEB okazigas jarkunsidon ĉiujare en Londono, komitato tie renkontiĝas kvarfoje jare. STEB eldonis almenaŭ kvar lernilojn. Surprize, f-ino Nixon nun havas la postenon 'Kasisto de ILEI'. Ŝi klare skribas, ke tio rilatas al ILEI kaj ne STEB – ni ja scias, ke la kotizo de ILEI estis fiksita en brita valuto (ses anglaj ŝilingoj). Ĉu sekve, ŝi tiam estis sekretario, kasisto kaj prezidanto?

===== finaj komentoj =====

Pri la estraraj konsistoj kaj elektoj post la fondo ĝis almenaŭ 1966 ni scias nenion. Nek pri kunsidoj de ILEI ĝis 1966 – kiam diveneble okazis la unua konferenco. Eĉ pri kelkaj el tiuj mankas informoj. Laboro por la veraj historiistoj!

SMG. La 14an de januaro, 2013.